


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

REDAKCIO : E. VAN VEENENDAAL-BOUWES, LIMMEN NH. NEDERLANDO • ADMINISTRACIO : T.J.O. CENTRO
WESTGRAFTDIJK NH. NEDERLANDO. ĜIRONo 382363 • JARABONO 1.50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO

BELGUJO INVITAS!!

Internacia Junularkunveno en Blankenberge 2, 3, 4, kaj 5 aŭgusto 1946a.

Fine definitive! En antaŭaj numeroj ni aludis la egajn malfacilaĵojn por la aranĝado de ĝenerala, internacia TJO-kunveno, sam-nivele kiel en 1938a kaj 1939a.

Grandeca gesto de nia belga amikaro tamen forprenis la dubon, ĉu la kunveno en Blankenberge povos okazi. La belgoj simple diris: „Kiel ajn, la kunveno en Blankenberge okazos. Ni aranĝos ĝin! Ĉu ĝi estos internacia? Ni ne scias, kiaj estos la ebloj de niaj alilandaj geamikoj post kelkaj monatoj, sed ĉiurilate: NI INVITAS ĈIUJN AKTIVAJN TJO-ANOJN!“

Do, la belga sekcio aranĝas kunvenon; ĉiu alilanda membro, kiu volos kaj povos veni, estos bonvena! Kaj ni ĝojas, ke ni povas diri, ke por la nederlandanoj la ŝancoj ne estas malfavoraj. Ni instigas la anglojn, francojn, danojn, kaj ĉiujn aliajn: Faru vian eblon! La restadkosto estas maksimume 16 ned. guld; la organizantoj tamen faros sian eblon redukti tiun prezon.

La vojaĝkosto (tien kaj reen) por la ned. anoj estas proksimume 16,50 guld. de Amsterdamo al Blankenberge laŭ Vlissingen. La nederlandanoj povos vojaĝi per komuna pasporto; kosto 35 c. Oni povas pagi la tutan vojaĝon en Nederlando. Detaloj pri la ceteraj financaj aranĝoj ĉe la landlimo sekvos.

Ĝeamikoj: MULTOPE AL BLANKENBERGE!

Anoncu vin al: Carlos Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, Belgujo. Klare indiku: adreson, sekson, naskiĝjaron, ĉu vi kunportos tendon, kaj ĉu vi iel povos kunlabori en la programo (kantado, muzikado, teatraĵo, ktp).

Nederlandanoj anoncu sin al Floor Meydam, Owenstr. 59, Leerdam, Ned.

la listo de la partoprenontoj:

Belgoj: 1. Carlos Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge (26-j); 2. Ph. Cullus, 3. Grand' Place, Braine-le-Chateau (18-j); 3. Raymond Philippon, Rue de la Libération 64, Braine-le-Chateau (20-j).

Nederlandanoj: 4. Henk Uittenbogaard, Koekoekstr. 22, Hilversum (25-j); 5. Hans Luyting, Zd. Scharwoude (19-j); 6. Floor Meydam, Leerdam (26-j); 7. Siem de Geus, Heilo; 8. Maarten Leegwater, W. Graafdiijk (23-j); 9. Job Kars, Marktstr. A 193, Raalte.

Nederlandaninoj: 10. Maartje Seilberger, Siondwardsstr. 16, Rotterdam; 11. S.ino E. v. Veenendaal-Bouwes, Limmen;; 12. Marie Snijders, „Avondzon”, Purmerend; 13. Ada v. d. Sleen, Nieuwlande; 14. Guus Bankersen, Koogerpolder (22-j).

Francinoj: 15. Helène Bernard, Instruistino, Avignon.

Angloj: 16. A. G. Bath, Colchester.

ANTONIE VAN LEEUWENHOEK.

Antonie van Leeuwenhoek naskiĝis en Delft (Ned.), en la jaro 1632a. Jam frue li perdis sian patron. Li iris al Amsterdamo, kie li ĝis sia 21a jaro laboris en la drapkomerco, kiel lernanto kaj servisto. Tio estis lia universitato. Tiam li reiris al Delft, edziĝis kaj starigis propran drapnegocon. Pri la sekvaj 20-jaroj de lia vivo oni scias malmulte. Ni nur scias, ke lia edzino mortis, ke li ree edziĝis kaj ricevis urban oficon. En tiu tempo li fariĝis pasia lensofaristo. Li aŭdis, ke oni tra malgrandaj, dikaj lensoj povas vidi la objektojn multe pli grandaj ol ili efektive estas.

Li ne estis instruita homo, li ne povis legi la latinan lingvon, do ne estis bone informita pri la scienco de sia tempo. Eble feliĉe, ĉar nun li devis fidi nur je sia propra cerbo, propraj okuloj kaj lerteco. Ĉie kaj ĉiam li serĉadis por novaĵoj. Li ne ripozis, antaŭ ol li povis fari la plej bonajn lensojn. Tiam li mem muntis ilin.

Verŝajne la najbaroj opiniis lin frenezeta, sed Leeuwenhoek daŭrigis. Kaj dum la homoj mokridis pri li, li sukcesis fari kelkmilimetrajn lensojn, kiuj malfermis al li nekonatan, mirigan mondon!

Ne kontentigis lin rigardi per sia mikroskopo nur ordinarajn objektojn: Li esploris la sangon, moviĝantan en la vosto de ranlarvo. Li esploris sian propran epidermon; trovis laŭlargajn striojn sur kelkaj muskoloj. De buĉisto li kunportis bovidan okulon, kaj tra sia lenso li vidis, kiom interesa estas tia organo. Dum horoj li rigardis haron de ŝafo aŭ de cervo, kiuj sub lia mikroskopo similis pezajn trajojn. Singarde li fortranĉis la kapon de muŝo, metis ĝin sur pinglo sub sian instrumenton kaj admiris la strukturon de la grandaj okuloj. Diversaj ligneroj, semeroj de plantoj, ktp. montris al li sian mirindan konstruon. Kiam li unuafoje vidis la buŝpartojn de pulo, li apenaŭ povis kredi tian miraklon.

Vere, ĉi tiu memlerninto esploris ĉion, sen difinita plano aŭ metodo, sen respekto por kio ajn: mondo da etaĵoj kuŝis antaŭ li.

Nur en la kapon de tia strangulo, kia Antonie van Leeuwenhoek povis veni la ekpenso esplori puran akvon. — Kion oni ja serĉus en ordinara, klara akvo?

Vi certe povas kompreni ke lia 19-jara filino Mario, kiu zorge flegis sian patron, tiun silenteman, strangan ulon, scivole sekvis lin per la okuloj, kiam li foje faris novan eksperimenton: Li prenis vitro-tubeton, tenis ĝin en la flamo, longe eltiris unu finon, poste iris en la ĝardenon, trempis ĝin en poton da akvo, kaj kunportis ĝin al sia laborejo. Kion tiu frenezeta patro nun faros?

Jen sonis obtuza voĉo: „Venu ĉi tien! Rapide! Tuj! Estas bestetoj en la pluvakvo..... Ili naĝas. Ili estas miloble pli malgrandaj ol la plej malgrandaj bestetoj kiujn ni per la nudaj okuloj povas vidi!”

Estis infuzorioj. La homo unuafoje renkontis ilin. Aŭ, pli bone, unuafoje vidis ilin.

Aleksandro la Granda iris al Hindujo, kaj vidis tie grandajn elefantojn, kiajn la grekoj neniam vidis — sed por la hindoj tiuj elefantoj estis same ordinaraj, kiel la ĉevaloj por Aleksandro.

Cezaro vojaĝis al Anglujo, kaj renkontis tie duonsovaĝajn homojn, pri kiuj li multe miris — sed por indiĝeno tiuj homoj ne estis pli strangaj ol la romaj soldatoj por Cezaro.

La malkovro de v. Leeuwenhoek estis tamen tute alia okazo. Ĉi tiu ne-instruita Delft-ano malkovris mondon, kies loĝantoj nask-

iĝis kaj mortis, interbatalis kaj detruis, ekde la komenco, kaj la homoj ne sciis pri tio! Malgraŭ la fakto, ke la homo estas multmilionoble pli granda ol ili, ili atakas, malsanigas, ja eĉ mortigas lin; etuloj, pli danĝeraj ol multkapaj hidroĵoj..... Ili estas la senbrujaj murdistoj, kiuj ĵetas sin sur la infaneton en ĝia lulilo, sur la reĝon en lia ŝirmata palaco.....

Leeuwenhoek estis la unua homo, kiu vidis tiun ĝis nun nekonatan, nevideblan, ŝajne sensignifan, kaj ofte tiom danĝeran mondon!

Multe ni dankas al la laboro de Antonie van Leeuwenhoek. Batalanto ankaŭ li estis, sed batalanto nur por la bono de la homaro.

Adopte, N. Kool.

„FAIRE FACE”.

„Faire Face” estas la titolo de la revue de la paralizitoj en Francujo. La lasta numero enhavis artikolon pri Esperanto.

Ni proponis al la paralizitoj instrui senpage la internacian lingvon per korespondado. Tio havigis al ni multegajn respondojn. Grandan esperon ni vekis! El ĉiuj regionoj de Francujo paralizitoj skribas al ni: — „Jes, ni dezirus lerni Esperanton por korespondi kun eksterlandanoj por trovi amikojn sur la tuta mondo. Ni estas tiel solaj!”

La plej multaj korespondantoj estas junaj; ili ne povas labori, sed havas tempon por legi, skribi, studi kaj pensi!

Esperanto estos distraĵo dum ilia unutona vivado. Nekonataj, malproksimaj amikoj skribos al ili pri aliaj celoj, pri aliaj kutimoj, ili povos interŝanĝi ideojn, elmontri sian personecon, diskuti pri literaturo, filozoffo, pliheliĝos ilia vivado, plialtiĝos ilia animo ...

Delonge la esperantista movado zorgis la malfeliĉulojn sur la tero. Jam antaŭ 1914a, dank’ al s-ano Cart, Esperanto disvastiĝis inter la blinduloj. Ankaŭ en la sanatorioj, gejunuloj lernas Esperanton.

Estas ankoraŭ orfoj, miloj kaj miloj da infanoj, de kiuj la milito forprenis la gepatrojn! Estas necese instrui al ili Esperanton, kaj interrilatigi, interkonatigi kaj interamikigi ilin!

En Lyon, dank’ al la helpo de la urbestro, oni komencis Esperantokurson en la orfejo: Adolphe Favre. Ĝin plezure akceptis la infanoj.

Ni vokas ĉiujn esperantistojn en la tuta mondo, por ke similajn kursojn oni gvidu en ĉiuj orfejoj.

Ni vokas ĉiujn, por helpi en la organizado de „internaciaj libertempaj kampadoj”, kie la plej lertaj lernantoj de tiuj kursoj povos dum kelkaj semajnoj interrilati kun ĉiulandaj gekamaradoj.....

El „Kompreni” trad. M. Turin-Montagnon.

PRINTEMPA FESTO DE „LA KAMPFLOROJ” en West-Graafdiijk, je la 27a kaj 28a de aprilo.

Kiel juvelo, brileganta smeraldo, kuŝas tie la malgranda vilaĝo, verda kiel radio de la Espero meze de la griza mondo.

Verdaj estas la paŝtejoj kaj verdaj estas la fruktarboj, nun pli belaj ol iam. Verda ankaŭ estas la koloro de la granda Idealo de la Esperantismo, kiun la vilaĝanoj portas en siaj koroj: la espero, ke iam la tuta mondo estos feliĉa loĝejo por ĉiu, kiel nun la vilaĝeto estas por ni, Esperantistoj.

El multaj partoj de Nederlando ni denove venis al tiu unika vilaĝo. Se vi serĉas lukson aŭ modernan komforton, ne venu al West-Graafdiijk. Sed nin ĉiam denove tiras tien la vere amikeca sfero, la pura ĝojo kaj super ĉio la varma amo por la homaro.

Ankaŭ la lasta kunveno ne seniluziigis nin. Ne pensu, ke ĉio konstante marŝis glate, sed inter multaj aliaj aferoj ni ankaŭ vidis, ke per optimismo por ĉiu malfacilaĵo, kiu komence ŝajnis nesolvebla, ekzistas elturniĝo.

Pripensante la lastan semajnfino mi denove vidas la fortan infangrupon, kiu nun ankaŭ estas parto de TJO; mi vidas nin sidantaj en la herbejo, vere amika rondo, aŭskultante la altvalorajn paroladojn kaj diskutadojn. Florojn mi vidas, multegon da floroj, kaj super ĉio la verdan koloron de la Espero, de la granda Zamenhofa Idealo!

Se la filmo, kiu estis farata dum tiu ĉi printempa festo montriĝos en via proksimeco, mi konsilas al vi: rigardu ĝin kaj eble ankaŭ vi sentos iom de la nepriskribebla amikeca sfero, kiu reĝas dum ĉiuj niaj TJO-kunvenoj.

Amsterdamo, 1 majo 1946.

Mary Kryt.

Kiu nun aliĝas al TJO, aŭ abonas „La Juna Vivo” ricevos la majan kaj junian numerojn senpage!! Kaptu la okazon, kaj aliĝu nun!!!

NIA TUTMONDA FAMILIO.

Tre granda estis kaj estas la ĝojo, kiam mi aŭdis, ke jam ekzistas internacia Esperanto-Junular-Organizo.

Mi estas 24-jara junulo kaj jam en la jaro 1937a mi ekkonis Esperanton per kurso en viena tag-gazeto. Ĝis nun mi fariĝis Esperantisto ĉiam pli fervora. Ankaŭ la plej terura milito pasis kaj revenis la paco por nia granda mondmovado, por nia Esperantomovado.

Nia lingvo havas tiom grandan valoron por la homaro, ke ni denove devas labori, ankoraŭ pli ol antaŭ la milito.

Gravaj estas regulaj rilatoj inter la tutmonda Esperantistaro, tial mi volas aliĝi al via „Junular-Organizo” kaj kiel regula ligilo mi esperas ricevi vian oficialan Esperanto-ĵurnalon. Mi ankaŭ volas kunlabori en la internacia Esperanto-movado kaj varbi anojn por nia amata lingvo „Esperanto” en mia hejmlando Aŭstrio.

Kun samideanaj salutoj, via nova membro kaj kunlaboranto aŭstra.

Johann L. Germela (Vieno, Aŭstrio).

Nun la kruela milito pasis, sed la postsignoj estas videblaj ĉie. Nun estas printempo, kaj ĉiuj vekigās el la dormo de la vintro, sed el la dormo de la milito multaj neniam plu vekigās.

Ni postrestantoj faru nian eblon konstrui la mondon tiel, ke ne plu estos malharmoniaj rilatoj inter la nacioj. Ni nur sopiru levi la verdan stelon supren, por ke ĝi brilu ĉien, kaj al ĉiuj.

Al la junularo estas la estonto! Elkore mi salutas ĉiujn TJO-anojn! Via finna amiko.

Eino Heinäharju, Turku, Finnlando.

Jam pasis tuta jaro post la granda paco-tago. Ni ĉiuj ja memoras la strangan, ĉarman printempan tagon, kiam atingis niajn orelojn la sciigo pri la kapitulacio de la germanaj trupoj. Tiu granda tago devus esti solenata de la tuta mondo. Precipe ni junaj esperantistoj forte salutis la alvenon de la paco. Ni ja dum kvin longaj jaroj ne multe povis labori kaj la kontakto kun la eksterlando preskaŭ tute estis rompita.

Kiam venis la „paceksplodo” denove malfermiĝis la grandaj ebloj kontaktiĝi kun la pli multo el la landoj.

Nun ni devas fidi je la unuigitaj nacioj kaj ilia laboro sekurigi la pacon en la mondo. Ili havu sukceson en tiu laboro je la utilo de ĉiu nacio.

Ankoraŭ estas mizero en multaj landoj, ankoraŭ daŭros multajn

jarojn antaŭ ol oni rekonstruis ĉion, sed ni scias, ke fakto estas la nova paca tempo per helpo de la grandega forto kaj volo de la monda junularo. — Ni junaj esperantistoj konscias pri la granda rolo kiun ludas nia organizo. Ni prediku „la evangelion de Esperanto”. Ni estas membroj de la granda mondampleksa familio.

Karl Erik Karlsson, Stokholm, Svedujo.

T.J.O.-RUBRIKO.

Sekr. F. Meydam, Owenstr. 59, Leerdam, Nederlando).

Finlando: (Ĉefperanto Sv. Kivinen, Vipurinlääni, Kouvola): Laŭ mia modesta opinio la prezoj de „LJV” estas tre oportunaj al ni finnoj, sciante la nunan situacion monan.

Ŝajnas, ke ankaŭ en nia lando la esperanto-afero ĝojige pli vigliĝas post la milito. Lastdimanĉe la Finnlanda Esperanto-Asocio jarkunvenis en Helsinko, kaj la kunveno estis kuraĝiga. Ekz. en la urbo Oulu nun funkcias tri kursoj.

Ĉion bonan al nia organizo, kore salutante,

Sv. Kivinen, Kouvola, Finnlando.

Francujo: (Ĉefperantino s-ino Turin-Montagnon, Trepot, Doubs): Resume jen la lastaj novaĵoj: Post la ricevo de la informoj de Floor pri la formuloj de IEL por UNO, mi petis ilin de U.E.F. en Francujo. Oni nur sendis ilin al mi la pasintan semajnon, kaj mi dissendis ilin inter la ĉefaj TJO-anoj.

Aperis artikoleto de mi en la gazeto por la junulargastejanoj en Francujo; sekve de tio mi jam ricevis kelkajn leterojn, por peti klarigojn ĉu pri Esperanto, ĉu pri nia TJO.

Kelkaj petis ankaŭ klarigojn pri la semajno en Belgujo.

M. Turin-Montagnon.


Hispanujo: (Ĉefperanto Octavio de Diego, Baltasar Gracian 12, Zaragoza): Kelkaj informoj pri la TJO-movado. Mi jam havas delegiton en la Kataluna Regiono kaj atendas novaĵojn de s-ano el Castellon de la Plana, al kiu mi skribis pri la afero. Unu el la ĉefaj malfacilaĵoj por la disvolviĝo de la asocio, krom tiuj, kiujn vi jam konas, estas ke ni ne havas konvenajn junulojn, tio estas, ke estas ege malfacile trovi samideanon inter nia junularo.

Nederlando: (Ĉefperanto H. Uittenbogaard, Koekkoekstr. 22, Hilversum): Dum la paskotagoj okazis kunveno en Hilversum. Dimanĉmatene estis pri-traktata la laboro de la laborkomitato de la ned. sekcio; posttagmeze ni aŭskultis du interesajn prelegojn: Jaap Ensink parolis pri „Budismo”, kaj Floor Meydam pri „Esperanto kaj la nuna junularo”. Vespere estis festa kunveno. Lundmatene ni vizitis la „Avro-Studio”, kaj posttagmeze s-ino Pikaar interese prelegis pri „La mio”.

Ĉefperantoj! Sendu ĉiumonate al la TJO-Centro etan sciigon por ĉi tiu rubriko pri la laboro en via lando.

Subtenu la Junular-laboron! Mendu viajn librojn ĉe TJO-Centro!

KIO ESTAS TIO?



La tago estas varma, ĉar la suno brilas. La du viroj iras al la verda benko en la ombro de la fig-arbo.

En la lumo de la suno dancas la papilioj super la sun-floroj, la flavaj floroj kun la nigra koro. Brunaj abeloj zumas super la blankaj floroj de la terpom-plantoj.

Apud la tomat-plantoj Jipi, nia juna hundo, kuras malantaŭ kelkaj papilioj. Sed la insektoj estas tre rapidaj kaj Jipi estas tro malrapida.

Gracia venas el la domo. La malgranda knabino kuras tra la ĝardeno al Patro sur la benko. Post kelkaj momentoj ŝi sidas sur liaj genuoj.

Gracia estas tre kontenta. „Kio estas tio?” ŝi demandas. Ŝia fingro montras al bruna besto. „Tio estas

abelo,” respondas ŝia patro. „Kio estas tio?” Ŝia mano montras al la blankaj insektoj super la sunfloroj. „Tio estas papilioj,” respondas Patro.

„Kio estas tio?” kaj „Kio estas tio?” Gracia demandas kaj demandas.

Sur la sojlo de la domo aperas Patrino. Ŝi vokas. Niaj(!) patro kaj najbaro iras al la domo. Nun Gracia sidas sur la ŝuldroj de Patro. Niaj(!) kato kaj hundo iras kun ili.

la abel-o	la genu-o	la man-o	la ŝultr-o
ŝi aper-as	insekt-o	la moment-o	tio
ĝi bril-as	jun-a	ĝi montr-as	tre
brun-a	kio	papili-o	tro
ili danc-as	la lum-o	la sojl-o	varm-a
el	mal-jun-a	la sun-o	ŝi vok-as
la fingr-o	mal-varm-a	sun-flor-o	ili zum-as

Ekzerco. Enmetu o-a; oj-aj: La urb.. Las Palmas estas grand.. urb... Luiza kaj Anita estas hispan.. knabin... En bel.. ĝarden.. staras kvar dik.. arb.. kun blank.. flor... Sur la alt.. tegment.. de nia dom.. sidas du griz.. kat... Kvin malgrand.. knab.. naĝas en la mar... Kelk.. flav.. papili.. dancas super la ruĝ..


flor... Jen iras du jun.. knabin.. kun blank.. flor.. en la nigr.. har...

Ekzerco. Enmetu: ŝi-ĝi-ili: La benko estas verda; ... staras sub arbo. La knaboj ludas sur la strato; ... kuras. La virino estas maljuna; ... iras al la benko. La abelo estas bruna insekto; ... zumas. La suno brilas; ... estas varma. Niaj(!) frato kaj fratino rajdas sur la mulo; ... ĝuas. Patrino iras al la urbo; ... revenas je sabato. Ni loĝas en domo; ... estas blanka.

Gramatika enhavo: la prepozicio: el; la korelativoj: kio tio; ripetado: mal-tra-super. — Atentu: niaj (j) hundo kaj kato.

Leciono 10.

KIA ESTAS NIA DOMO?



En la domo de la familio Novano estas ses ĉambroj. La ter-etaĝo konsistas el: unu granda ĉambro, dormejo por Patro kaj Patrino, koridoro kun ŝtuparo al la etaĝo; en la etaĝo estas dormejo por la tri knaboj, dormejo por la tri knabinoj, malgranda dormejo por gasto kaj la banejo. Super la etaĝo estas la subtegmento. La necesejo estas en la ĝardeno malantaŭ la domo.

En la granda ĉambro ni kuiras, ni manĝas kaj ni sidas; ĝi estas nia kuirejo kaj nia manĝejo.

Kia estas la granda ĉambro? Ĝi estas kvadrata. En ĝi estas du fenestroj, verda pordo al la legom-ĝardeno kaj verda pordo al la koridoro. La kvar

muroj kaj la plafono estas blankaj; la planko konsistas el ruĝaj kaheloj. Ĉu estas mebloj en la ĉambro? Jes! en la ĉambro staras du tabloj, ses seĝoj, du benkoj, du ŝrankoj kaj granda forno. *Kiaj* estas la mebloj? Ili estas lignaj; la forno estas fera. La tablo en la mezo de la ĉambro estas granda kaj kvadrata; la tablo en la angulo estas malgranda. La ŝranko por la teleroj, pladoj, tasoj kaj glasoj estas la bufedo; la ŝranko kun tirkestoj estas la komodo.

la ej-o

la gasto dormas en gast-ej-o.	ni banas en ban-ej-o.
la homo loĝas en loĝ-ej-o.	ni dormas en dorm-ej-o.
la hundo loĝas en hund-ej-o.	ni kuiras en kuir-ej-o.
la koko loĝas en kok-ej-o.	ni manĝas en manĝ-ej-o.
la kuniklo loĝas en kunikl-ej-o.	

la angul-o	la kahel-o	la mebl-o	la ŝrank-o
la bufed-o	kia(j)	la neces-ej-o	la ŝtupar-o
la ĉambr-o	la komod-o	la plad-o	la tabl-o
fer-a	ĝi konsist-as el	la plafon-o	la tas-o
la forn-o	la koridor-o	la plank-o	la teler-o
la gast-o	kvadrat-a	la seĝ-o	la ter-etaĝ-o
la glas-o	lign-a	la sub-tegment-o	la tirkest-o

Ekzerco. Respondu al jenaj demandoj: *Kia* estas la abelo? la papilio? la hundo? la kato? la mulo? la kuniklo? Ramono? Gracia? Luiza? vi? via domo? via amiko aŭ amikino.

Gramatika enhavo: la sufikso: ej; la korelativo: kia(j).

Korektoj el la antaŭaj lecionoj: Sur paĝo 36: farmoj devas esti farm-domoj. — Sur p. 48: banao d.e. banano; el la vortlisto sub as elfalis: ili reven-as. — Sur p. 35 kaj 49: pulso d.e. man-artiko (ne manradiko). — Sur p. 70: nia domo kaj ĝardeno d.e. nia domo kaj nia ĝardeno; el la vortlisto sub a elfalis: dik-a; sub o: virin-o d.e. vir-in-o. — Sur p. 71: La kopulo; d.e. La kópulo; ili restas malgrandaj kaj estas malbonaj d.e. ili restas malgrandaj kaj malbonaj; super la vortlisto alt-a ktp. elfalis: mal. — Sur p. 72: la sufikso: mal d.e. la prefikso: mal; manradiko d.e. manartiko.

POR KOMENCANTOJ.

La nomoj de la tagoj.

Hodiaŭ ni lernas la nomojn de la tagoj, ĉar ankaŭ la tagoj havas nomojn. Ili estas: lundo, mardo, merkredo, jaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo. Hieraŭ estis lundo, hodiaŭ estas mardo, kaj morgaŭ estos merkredo. Morgaŭ mi skribos leteron al mia kuzo en Londono. Estas mia propra kulpo, ke mi tiel longe ne skribis al li. Sed mi scias, ke li pardonos al mi mian prokraston. La vetero estis ĝis nun tiel bela, kaj mi tiom ŝatas la sporton, ke mi ne trovis tempon por skribi leteron. Sed mi certe faros tion postmorgaŭ.

Kiam estas bela vetero ni ofte pilkludas. Ni kunvenas sur la granda placo ekster la urbo kaj tie ni ludas dum kelkaj horoj. Hierau mi ne ludis, ĉar mia patro ne permesis al mi iri tien. Li punis min, ĉar mi ne obeis lin antaŭhierau, kaj ne revenis je la ĝusta tempo.

Respondu al jenaj demandoj: Ĉu la tagoj de la semajno havas nomojn? Ĉu vi scias la nomojn de la tagoj? Kiu tago estas hodiaŭ? Kiu tago estis hierau? Kiu tago estos postmorgaŭ? La kioma tago estas hodiaŭ? Ĉu vi ŝatas skribi leterojn? Al kiu la knabo devis skribi leteron? Kie loĝas lia kuzo? Kial la knabo ne skribis ĝis nun? Kia estis la vetero? Kion la knabo tre ŝatas? Kion la knabo ofte faras? Kie estas la placo? Kial la knabo hierau ne povis ludi? Kial la patro punis lin? Kia estis la knabo antaŭhierau?

La ruza piediranto.

Sinjoro devis iri al la urbo. Ĉar li estis malriĉa, li devis piediri. La vetero estis tre malvarma, kaj sur la vojo kuŝis neĝo.

Subite la sinjoro aŭdis, ke venas glitveturilo. Li rigardis, kaj vidis ke en la veturilo estas nur unu viro.

„Ho!” li kriis al la viro, „Ĉu vi povas kunporti mian surtuton al la urbo?”

La veturilo haltis, kaj la veturigisto diris: „Kompreneble mi povas kunporti la surtuton, sed kiel vi retrovos ĝin en la urbo?”

„Nu, tre simple!” respondis la sinjoro, „Mi restos en la surtuto!”

La veturigisto ridegis, kaj ili kune veturis al la urbo.

Respondu al jenaj demandoj: Kial la sinjoro devis piediri? Kien li iris? Kia estis la vetero? Kio kuŝis sur la vojo? Kion aŭdis la sinjoro? Kion li vidis? Ĉu la glitveturilo estis plena? Kion demandis la sinjoro? Ĉu la glitveturilo haltis? Ĉu la veturigisto kunportis la surtuton? Kio okazis?

La blindulo kaj la paralizito.

En urbo vivis du malfeliĉaj homoj. Unu estis blinda, kaj la alia ne povis iri pro paraliza je la kruroj. Ambaŭ estis tre malriĉaj, kaj ambaŭ deziris morti, ĉar por ili la vivo estis tre malagraba.

La paralizito ĉiam kuŝis sur ŝtona benko en la publika parko, sed neniu zorgis pri li. Ankaŭ la blindulo estis sola en la mondo. Li eĉ ne havis hundon por gvidi lin.

Iam la blindulo palpe iris tra la parko. Subite li aŭdis la ĝemojn de la paralizito. Li iris al la benko, kaj diris: „Mi estas tre malfeliĉa, ĉar mi ne povas vidi, sed ankaŭ vi certe ne estas feliĉa. Eble ni povos helpi unu la alian?”

„Ah, ne,” diris la paralizito, „mi ja tute ne povas iri, kaj vi ne povas vidi, do kiel ni povos kunlabori?”

„Aŭskultu,” respondis la blindulo. „Mi havas du sanajn krurojn, kaj vi havas du sanajn okulojn. Mi portos vin, kaj vi vidos por mi! Tiel ni en la vivo povos helpi unu la alian!”

Anekdoto.

„Joĉjo, se mi donas al vi 16 nuksojn, kaj vi devas dividi ilin inter vi kaj via frateto, kiom li ricevos?”

„Ses”.

„Sed Joĉjo, ĉu vi ne povas kalkuli?”

„Certe jes! Mi povas bone kalkuli, sed mia frateto ne povas!”

Korektu la erarojn:

La rusa Frico.

Frico estis zaĝa bubeto. Kun la patrino li visitis la onklino. Frico defis promesi, ge li nenion petos por manĝi ce ŝi.

Nun li zidas ce la onklino, kaj la patrino tre vikle parolas kun si. Ili ne atentis pri la bubeton. Li gis nun ricevis ec ne unu peco da cokolato. Kaj Frico tiom ege malzatas.

Subite li diris: „Onglino, cu vi malzatas?”

„Ne, karulo mia,” respondas la onklino kun miron.

„Ho,” gemis Frico, „se mi estus fi!”

Kaj li riĉevis granda peco da cokolado.

La sekalo-spikoj:

Korektita ekzerco el la aprila No. Vilaĝano kaj lia filo iris al la kampoj por vidi, ĉu la sekalo jam maturiĝas. Ili venis al kampo, kaj rimarkis ke kelkaj trunketoj kreskas rekte supren. Sed la plej multaj klinis la kapetojn teren.

„Estas domaĝe,” diris la filo, „ke nur malmultaj herbetoj staras rekte. Jen vidu, patro kiel fiere ili tenas la kapojn ĉielen. Oni devas bedaŭri, ke tiom multaj malsanas kaj malserene rigardas teren.”

„Vi eraras,” respondis la patro. „La spikoj, kiuj tiom multe fieras, estas malplenaj kaj ne utilas al ni. Sed la aliaj, la modestaj, kiuj klinas teren, estas plenaj de greneroj kaj de ili ni ricevos la bonan panon. Estas kiel ĉe la homoj. La plej modestaj kutime estas la plej utilaj, la plej fieraj homoj ne taŭgas.”

KURSFINO.

Mi gvidis kurson laŭ la parola metodo. La 28a leciono estis la lasta. Tiam mi faris provon. Mi sciis, ke miaj lernantoj komprenas

min, kiam mi parolas en Esperanto. Sed mi demandis al mi: Ĉu miaj kursanoj komprenas aliajn esperantistojn? Por kontroli tion mi invitis bonan konaton el alia urbo. Li ne konis la enhavon de mia parola kurso. Lia tasko estis rakonti ion per simplaj vortoj. Mia konato parolis komence tre malrapide. Estis simpla rakonto pri la deveno de la artefarita muziko. Kelkfoje li haltis kaj demandis ion al la kursanoj. La respondoj venis flue. Ĉiuj komprenis la rakonton el la buŝo de „fremda” esperantisto. Ni ĝojis pro tio. Mi daŭrigis per esperanta vortludo sur paperetoj. La kursanoj bezonis iom da ripozo.

Poste mia amiko el la urbo denove parolis al la kursanoj. Ĉiuj atente aŭskultis. Li parolis pri esperanto-klubo, landaj organizoj kaj tutmondaj organizoj. La parolrapido nun estis normala. Nek tro rapide, nek tro malrapide. Kelkfoje ia demando al la „publiko” por kontroli la komprenon. Ĉiuj komprenis, ke estas ne bone resti sola esperantisto. Oni devas esti en klubo aŭ organizo. Tiam oni povas uzi la lingvon kaj kunlabori al la idealo de Zamenhof: Pli-bonigi la rilatojn inter la homoj.

La kursanoj decidis fondi esperanto-grupon kaj aliĝi al TJO. Ĉiuj estis kontentaj pri la sukceso de la parolprovo. Naŭ kursanoj sin anoncis por la vojaĝo al Danujo. Ili nun scias, ke ili komprenas Esperanton. Mi estas kontenta pri la rezulto de mia kurso laŭ la parola metodo. Denove mi konstatis la facilecon de Esperanto, ĉar nur en tiu lingvo povis sukcesi mia lingvoprovo. Sirmo.

POST LA STUDO LA PRAKTIKO.

Sinjoro Sirm' la kursgvidanto,
 Propagandist' de Esperanto,
 Decidis fari gravan provon:
 Li volis scii lingvan povon
 De la kursanoj el la klubo,
 De plenaĝulo kaj de bubo,
 Por ke ekestu nova rondo
 En la esperantista mondo.

Post dudek-oko da lecionoj,
 Post korektadoj kaj admonoj,
 Li trovis la kursanojn pretaj
 Por ekfariĝi membroj netaj.
 Do, venis fremda parolulo,
 Parolis pri leon' kaj kulo,
 Pri organizo kaj ferio,
 Kaj pri tutmonda harmonio.

Sinjoro Sirm' konstatis ĝoje
 Ke la kursanoj ĉiufoje
 Respondis flue al demando
 De parolant' el „fremda” lando.
 Kaj ĉe la fino de l'kunveno
 Okazis la plej gaja sceno:
 Ĉar jen fondiĝis grupo nova
 Post parolado lingvo prova.

Kuraĝa pro la ekkompreno
 Decidis tuj al partopreno
 En la vojaĝo al Danujo
 La tuta grup' el Herhugujo.
 La lingvaj baroj ne plu estas,
 En sia land' neni restas,
 Ĉar estas nun *Esperantujo*,
 La tuta Mond', nia Patrujo.

Onklo Pit (6-4-'46).

ENIGMO.

Limako rampas sur fosto, kiu estas 20 m. alta. Dumnokte ĝi progresas 11 metrojn, sed dumtage ĝi glitas malsupren 10 metrojn.

Kiom da tagoj ĝi bezonas por atingi la supron?

Solvojn oni sendu antaŭ la unua de julio al la TJO-Centro en W. Graafthijk, Nederlando. Inter la ĝuste-solvintoj ni lotumos jarkolekton de „La Juna Vivo”.

D
ORO
PLORI
KERMESO
DROMEDARO
KANDELO
DRAMO
IRI
O

La solvo el No 99 (marto '46).

La premion gajnis P. A. Klaver, A 153; Oudkarspel, Nederlando.

La solvo de „Kiu estas la maŝinisto?”

La nomo de la maŝinisto estas Tomson.

1e: S-ro Karlson loĝas en Londono. 2e: la bremsisto loĝas en Oksfordo; 3e: la jarsalajro de s-ro Adamson estas £200; 4e: Tomson pli bone bilardludas ol la hejtisto, do: Tomson ne estas la hejtisto; 5e: La jarsalajro de la bremsisto estas £100; 6e La jarsalajro de la

komercisto, kiu loĝas apud la bremsisto (en Oksfordo) estas £300. Ĉi tiu komercisto do ne estas s-ro Karlsson, ĉar tiu loĝas en Londono, nek s-ro Adamson, ĉar ties salajro estas £200, do la komercisto el Oksfordo kun la salajro de £300 estas s-ro Tomson; 7e: la tria komercisto, Adamson, loĝas en Bristol, kaj havas la saman nomon kiel la bremsisto. Do la bremsisto nomiĝas Adamson; 8e: ni jam trovis, ke Tomson ne estas la hejtisto, do Karlson estas la hejtisto. Konkludo: Tomson estas la maŝinisto.

La premion gajnis André Lefillastre, Equeurdreville, Francujo. Konsol-premion ricevis Jan Leguit en Krommeniedijk, Nederlando. (Ĉar preskaŭ neniu rimarkis la eraron en la enigmo, ni akceptis la solvojn, sed P. Rulofido prave rimarkis, ke la donitaĵoj interkonfliktas: Laŭ la fina konkludo la sinsekvoj de la nomoj kaj funkcioj ja estas identaj).

NI PROPAGANDU!

La lotumado por akiri filmaparatojn jam bone marŝas!

Ni farigis 3000 lotojn, po 25 c., en belaspektoj libretoj de 10 ekz. Sur la lotoj staras nia devizo: *Esperanto en la lernejo!* Geamikoj, por tiu celo vi certe pretas streĉi viajn fortojn, kaj do: Petu kiom eble plej baldaŭ kvanton da lotoj ĉe la TJO-Centro. Estos valorplena ĉefpremio!

Sed — por 3000 lotoj ni bezonas multajn premiojn! Espereble vi ankaŭ en tio helpos! Se vi mem ne povas malhavi ion por donaci, vi eble povas propagandi nian aferon ĉe butikistoj kaj komercistoj. Ĉio estos bonvena ĉe la TJO-Centro! Jam ni ricevis jenajn premiojn: fornobenketon, gazetujon, ŝtrumpojn kaj ŝtrumpetojn, florujojn, libron, ktp. — Ju pli da premioj, des pli facile vendiĝos la lotoj!

Ek al la laboro!!!!

KORESPONDADRESOJ.

Belgujo: „Nordmara Stelo”, junulargrupo, dez. kor. per il. poŝtk. kun gejunuloj el la tuta mondo. La membroj estas 16-19-j. Skribu al la sekr. (18-j): Raymond Wylleman, Rijksnormaalschool, Blankenberge.

„TJO-klubo” dez. kor. per il. poŝtk. kun gejunuloj en Svedujo, Anglujo, Danujo, Hispanujo kaj Aŭstrio. La membroj estas 15-18-j. Skribu al la gvidanto: C. Braet, Esseboomstr. 1, Brugge.

Fino Raymonde Renders, Consciencestr. 5, Blankenberge (18-j) nepre volas kor. kun geamikoj en Sud-Afriko, en ned., franca aŭ esp. lingvo.

S.ro Alain Scheldeman, Wahisstr. 186, Meenen (17-j. skolto) volas kor. kun geskoltoj en fremdaj landoj. Prefere ne el Francujo, Nederlando aŭ Anglujo. Per let. kaj ilustr. poŝtkartoj.

Britujo: Mi volas konatiĝi kun vi. Espereble vi volas sendi kelkajn poŝtm. Rodney K. Hannam, 2, Harbour Hill Crescent, Poole, Dorset.

Ĉu vi volas interŝ. poŝtmarkojn kun Keith Norman Drew, 159 Rosemary Rd., Parkstone, Dorset?

13½-jaraj knabinoj, de Sidcot School, Winscombe, Somerset, kiuj studis esperanton dum duona jaro, deziras korespondi.

Bulgarujo: F-ino Raŝel Meŝulam, str. Mutkurova N. 91, Russe, 20-jara kudristino, dez. kor. kun amerikanoj.

Finnlando: Nova grupo dez. esperantaĵojn por ekspozicio. Helpu! Sendu leterojn, poŝtkartojn aŭ kio ajn. Ni respondos! Adr: Poŝtista Studrondo, Turku.

Danujo: 40 gekursanoj dez. korespondantojn en ĉiuj landoj. Nielsen, Havelpladsvej 136-1, Fredericia.

Francujo: S-ro A. Lefillastre, 3 rue Lepoittevin, Equeurdreville, Manche, sendas 6 belajn poŝtkartojn (3 artajn vidaĵojn de Cherbourg, plumdesegnitajn de li, kun Esp. tekststo) kontraŭ 2 resp. kuponoj.

Nederlando: 5 gejunuloj 15-16-19-25-jaraj, dez. kor. Certe respondos. J. Jonker, St. Maarten B 59 (NH).

Guda Meysen, 18-j. knabino, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Spykerboor (NH). S.ro H. S. Goudsmid, Regentesselaan 20, Rijswijk, 20-jara holanda judo, postrestis sola de tuta familio, deziras korespondi.

Portugalujo: João Frazão de Faria (16-j), R. José Estêvão, 26-3°. E. Lisboa, dez. kor. kun pr. samaĝa nederlanda fino, kiu sufiĉe bone scipovas esperanton, kaj interesiĝas pri la interŝanĝo de esp. libroj kaj gazetoj.

Internaciaj kunvenoj.

En nia sudfranca vilaĝo mi intencas organizi „Esperantan semajnon”, kiel mi faris ĉiujare. Sed en 1946 mi klopodos venigi 10-15 eksterlandajn gejunulojn. La restadejo konsistos el komuna loĝejo aŭ tendo.

Ĉu vi povas instigi alilandajn gejunulojn partopreni mian Esp. semajnon? Adreso: S.ro Lentaïne, Instruisto, Balaruc-Les-Bains, Hérault, Francujo.

En „Kampoord” (Soesterberg, Ned.) okazos de 7-14 aŭg. kunveno por junaj TJO-anoj. Kostoj f 15 (enkluzive manĝaĵoj ktp). Espereble fariĝos internacia kunveno. Detaloj sekvos en la junia numero. Jam nun anoncu vin ĉe Mary Kryt, Veeteeltstr. 156, Amsterdam, Nederlando.

	TJO	LJV
Belgujo: C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, ĝiro 4770.86	40 fr.	24 fr.
Britujo: F.ino Rees, „Derwydd”, Seven Sisters, Neath, Glam. Wales	5 ŝil.	ŝ 3
Bulgarujo: Sterjo Z. Kukuŝev, Str. Michael 14, Peŝtera	125 lev.	75 lev.
Danujo: C. Jensen, Musikhuset, Nykøbing, F.	5 kr.	3 kr.
Finnlando: Svante Kivinen, Vipurinlääni, Kouvola ...	125 fmk.	75 fmk.
Francujo: S.ino Turin, Instruistino, Trépot, Doubs. Gironumero 287.02, Dijon.	100 fr.	70 fr.
Hispanujo: Octavio de Diego la Rosa, Baltazar Grancían 12-3°, Zaragoza	500 pes.	7 pes.
Italujo: Prof. Camuffo Armando, v. Bartolomeo, d'Alviano 4 IV, Trieste	5 ŝ	3 ŝ
Maroko: S.ino I. Fink, 5 rue de Savorgnan de Brazz, Casablanca	100 fr.	60 fr.
Nederlando: TJO-Centro, West-Grafdijk, ĝiro 382363	f 2,50	f 1,50
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferro, Rua B. No. 28—20 Dto, Lisbono	25 esk.	15 esk.
Norvegujo: Norv. Esp. Ligo, Box 942, Oslo	5 kr.	3 kr.
Svedujo: K. E. Karlsson, Upplandsgatan 69 ¹ , Stockholm, ĝironumero 252674	4 kr.	2½ kr.
Svisujo: Eugen Kleen, Brasselmühle, Rheineck ...	4 fr.	2½ fr.

La landaj ĉefperantoj kaj aliuloj, kiuj posedas monon destinita por TJO-LJV, bonvolu je la fino de la organiza jaro (30-6-'46) skribi al la TJO-kasisto M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam (Ned.), kiom da mono estas en ilia posedo. Tio necesas por pretigi la finanĉan jarraporton.

Oni povas pagi sian TJO-kotizon aŭ abonon je LJV per poŝtmarkoj neuzitaj. Sed nur per kompletaj serioj da neuzitaj poŝtmarkoj, kaj prefere novaj eldonoj. Sendu ilin rekte al la TJO-Centro.

Nia trezorejo: Z. en B.: f 0,50; N. N.: f 10; H. en H.: f 1,50 (ĉiuj en Nederlando); R. en L.: f 0,53; D. S. B. en L.: f 0,53; C. M. en S.: f 1,32; Z. R. J. P. en W.: f 0,53; F.ino W. en N.: f 3,18; A. en K.: f 1,32; D. en L.: f 3,18; F.ino M. C. G. en I.: f 0,53; F.ino R. R. en S. S.: f 10,58 (ĉiuj en Anglujo).

ANONCETOJ.

PAŜO POST PAŜO. Esperanto-lernolibro por nederlandanoj, verk. de J. W. Minke kaj F. Boom-de Vries, eld. de C. A. J. v. Dishoeck, Bussum.

Prezo: I-a parto (24 lecionoj, 150 p.): f 0,80; 2a parto (24 lecionoj, 208 p.): f 1. Mendeblaj ĉe TJO-Centro, West-Grafdijk.

INTERNACIA KULTURO. Monata, grandformata, riĉe ilustrita 16-paĝa revuo, eld. de Bulgara Esp.-Asocio. Jarabono 4. guld. (10 numeroj). Petu specimennon! Mendebla ĉe „TJO-Centro”, West-Grafdijk, Nederlando.